

Tagiĝo

N-ro 42	Bulteno de Esperanto-Junularo en regiono Ostrava, Ĉeĥoslovakio. - Redaktas: Inĝ. Jan Werner, OSTRAVA-Kunčice, Na Lachu 6	DECEMBRO 1958
------------	--	------------------

En novan jaron!

Per tiu ĉi numero adiaŭas kun la legantoj de Tagiĝo ties ĝisnuna eldonanto, Esperanto-Junularo Opava, fako de la Domo de Klerigo de Petr Bezruč en Opava. Pro la 7-jara pionira laboro pri Tagiĝo la grupo meritas de la esperantistaro altan rekonon kaj dankon. Samideanoj J. Kuzník, J. Solnický, A. Frantl kaj la ceteraj modestaj helpantoj, dankon al vi! La laboro farita estis malfacila, sed grava. Sed nepre ne starigu vin flanke, disponigu al ni viajn spertojn. Sekvu garde la eldonstafeton, Ostrava-regiono ne povas resti sen sia ligilo. La regiono de Petr Bezruč, la regiono de karbo kaj fero, havas fortan movadon esperantistan. Ministroj el Ostrava, Karviná, Orlová, Michálkovice, fandistoj el Vítkovice, Bohumín, Třinec, konstruantoj de Havířov, Poruba, NHKG, ĉiuj fieras pri sia scio de Esperanto, pri sia aparteno al la avangardo de batalantoj pri paco kaj proleta internaciismo per Esperanto, per la metodo moderna kaj praktika.

Esperantistoj de la regiono Ostrava postulas, ke Tagiĝo aperadu plu. Třinec anoncas, ke nombro de la legantoj estos tie altigita. Tramistoj el Ostrava informas, ke ĉiuj membroj de la grupo esperantista pagos Tagiĝon en formo de grupa jarkotizo.

Sed plej ĝojiga sciigo venis el Vítkovice, el la Esperanta Fakoj de la Uzina Klubo de VŽKG. Ili eldonados bultenon por esperantistoj de Ostrava-regiono. Tagiĝo, kiu havas en Ostrava-regiono longjaran progreseman tradicion, eĉ antaŭmilitan (Radvanice), daŭrigos sian ekziston kiel bulteno aŭ cirkulero konsilanta, instruanta kaj informanta. Plu tenos ĝin juna generacio, kiu en Ostrava formas kernon de la grupo en Vítkovice.

Kiu deziras plu ricevi Tagiĝon, bonvolu per almetita pagilo sendi monsubtenon (12 Kčs) por la jaro 1959.

Novaj interesuloj aliĝu kaj postulu la pagilon ĉe la nova adminiistranto: VI. Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3.

Ofte okazas, ke redakcian materialon vi sendas al la administranto kaj male pri administraj aferoj vi skribas al la redaktoro. Ĉion, kio rilatas enhavon kaj grafikan aranĝon sendadu nur al la redakcio de Tagiĝo : Ostrava-Kunčice, Na Lachu 6.

Ankoraŭ unu kompletiga sciigo: En la jaro 1959 Tagiĝo aperos denove 6-foje proksimume po 24 paĝoj. Certe ĝi estas ĝojiga raporto novjara.

Prosperan Novan Jaron 1959!

Jan Werner

INTERBABILADO EN OSTRAVA

Jam la sepan fojon ni rekunvenis en Ostrava, por ĉeesti la tradician junularan aranĝon INTERBABILADO. El la kunveno de loka signifo por la regiono Ostrava elkreskis iom post iom kunveno kun signifo pli vasta, kiun partoprenas gesamideanoj el la plej malproksimaj lokoj ĉeĥaj kaj slovakaj. Tiu ĉi kunveno donas al ni senton de la kolektiva forto, refreŝigas niajn iamajn bonajn intencojn - kiujn eble intertempe kovris polvo de forgeso - donas al ni amuzon kaj instruon.

Krom oktobre en Ostrava ni kunvenas decembre en Praha, februare en Brno kaj somere en la tradiciaj Esperanto-Tendaroj. Ĉiuj ĉi eventoj estas aranĝataj pro nia deziro prosperigi la junularan Esperanto-movadon en nia respubliko. Sed nur kapabla grupo kun organizemaj gvidantoj scias efektiviĝi tian kunvenon, prepari altnivelajn programojn, kiujn la ĉeestintoj poste ĝuas.

La 25-an de oktobro 1958, sabate vespere, okazis en Ostrava la unua prelego de la Interbabilada programo. S-ano inĝ. J. Werner paroladis pri konstruado de la socialismaj urboj. La

prelego estis tre bone akceptita, ĉar la temon traktis fakulo ne nur arkitekta, sed ankaŭ Esperanta. La atento de la aŭskultintoj estis pli streĉita, ĉar granda parto de la prelego estis dediĉita al problemoj ligitaj kun konstruado de Poruba kaj Havířov, t. e. al partoj de la urbo, en kiu ni kunvenis. Aktualajn problemojn de la moderna arkitekturo delate ilustris lumbildoj, projekciataj je la finparolado. Postkiam finis s-ano Warner sian paroladon ekestis amika babilado, kelkaj ges-anoj foriris en la urbon por konatiĝi kun ĝia nokta vivo.

Dimanĉa programo estis la plej ampleksa. En Poruba, je la 10-a horo malfermis s-ano Adámek laborkunvenon, kiu devis esplori kaj analizi aktivecon de niaj grupoj dum la lasta tempo. Sed la kunveno en sia daŭro akiris iom alian karakteron.

S-ano D. Kočvara, ano de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (ĈEK) kaj gvidanto de la junulara movado, donis la ĉefan raporton pri la nuna situacio. Li skizis evoluon de ĈEK kaj konstatis, ke ĝi fine jam oficialigis kaj la unuopaj membroj ricevis ministeriajn dekretojn. Poste li klarigis pozicion de la junularo en ĈEK kaj tuŝis problemon de la kunlaboro kun ĈSM.

Transirinte al la propraj junularaj problemoj li akcentis neceson de la konstanta kresko de la lingva nivelo en niaj grupoj. Sentiĝas forte manko de la regionaj delegitoj, kies reto devas esti restarigita. La regionaj kunvenoj (regule okazigataj nur en regionoj Ostrava kaj Olomouc) havu ĉiam difinitan enhavon (ekz. : Esperanto en lernejoj; Preparlaboroj por SET, ktp.). Ĉe ĉiu esperantista klubo ni devas krei favorajn kondiĉojn por fondo de la junular-grupo.

En la sekvanta diskuto s-ano inĝ. Werner petas opiniojn de la ĉeestantoj pri la nivelo kaj utilo de Tagiĝo, kies redaktoro li estas. Li antaŭ tio skizas evoluon kaj celon de Tagiĝo. Li konstatas, ke post la pasintjara kampanjo oni akiris 700 abonantojn. El la 144 planitaj teksto-paĝoj estis jam 132 presitaj kaj la plano estos eble superita.

En la diskuto al tiu ĉi problemo montriĝis, ke Tagiĝo apartenas nedisigeble al nia vivo. Ĝi estas nia ŝatata amiko, kiu jam dum 6 jaroj nin informas, instruas kaj amuzas. Nune ĝi estas la sola serioza Esperanta informgazeto, kiu aperas en ĈSR. La diskuton pri Tagiĝo fermis s-ano R. Hromada, kiu proklamis, ke Tagiĝo sendube apartenas el la redakta flanko al la plej bonaj Esperantaj gazetoj en la mondo.

Pri la aktiveco de unuopaj grupoj ni ne parolis en la diskuto: Al la dimanĉa kunveno, kiun partoprenis 75 ges-anoj el 30 lokoj, oni povus riproĉi ioman inerton, kiu antaŭe en la junularaj kunvenoj ne estis konata.

Posttagmeze en la sama salono okazis prelego de s-ano V. Novobilský pri novaj laboroj de niaj tradukantoj. Estis prezentitaj specimenoj el la novaj tradukoj de s-anoj Pumpr, Kořínek, Hromada, Lukáš, Vondroušek, Cink kaj Mráz. Kunlaboris gejunuloj el Ostrava, Opava, Brno kaj Praha, kiuj deklamis kaj legis la fragmentojn. En la prelego montriĝis la nuntempa aktiveco de niaj tradukantoj. La prelegon malhelpis la tro mallonga tempo, kiun oni disponigis al la parolinto.

Scivole ni iris vespere al Ostrava-Vítkovice, kie en ZK Moravskoslezské armaturky oni preparis por ni estradan programon "Ĉiu komenco estas malfacila". Deklamis, muzikis kaj aktoris membroj de la satir-grupo ERINACO. En la unua parto ni aŭskultis violon-ludon "Kalifo el Bagdado de F. Boieldieu. Ludis Ondřej Macura, pian akompanis Lída Čermáková. Neforgesebla estis la melodramo "Nur solan fojon" de Petr Bezruč, en traduko de J. Kořínek, fare de s-ano Werner, pianakompanata de L. Čermáková.

La dua program-parto estis kalejdoskopo de gajaj kaj satiraj skeĉoj, kiuj atakis strangaĵojn en nia esperantista vivo. Tio ĉi estas nepre saniga metodo! Tamen ĉe la satiro oni tre facile transpaŝas limojn de la takta kritiko. Des pli oni evitu personan ironiigon!

Post la du-hora programo oni komencis danci. La plejparto de la ĉeestintoj estis dancema - la bonhumoro kulminis je la 3-a horo post noktorezo (sed pri tio mi ne estas kompetenta skribi, ĉar tiam mi jam dormis).

Lunde matene, en ZK estis la oficiala Interbabilada programo finita. Oni kunsidis en du sekcioj. S-ano Werner gvidis tiun, kiu okupiĝis pri la organizado de la Someraj Esperanto-Tendaroj. S-ano D. Kočvara parolis en la dua pri metodoj de la kursgvidado. La tria sekcio "Esperanto en lernejoj" ne efektiviĝis pro necesto de la gvidanto.

El la unua sekcio oni elektis novan preparkomitaton, kiu zorgos pri la teknika kaj instrua

flankoj de la venontjaraj tendaroj. La komitaton prezidas s-ano M. Neuwirth. Estis diskutata aranĝo de la hotela kolegio, sed ĝi estas malakceptita kiel nekonforma al la junularaj lernometodoj. La preparokomitato principe organizos nur la tendarojn (2-3 kun ĉ. 150 personoj). Efika propagando per koloraj afiŝoj kaj diafilmo estos komencita kiom eble plej baldaŭ. Rezultoj de tiu ĉi laborkunsido donas esperon pri la bona organizado de niaj someraj lernejoj en la jaro 1959.

Per la lundaj kunvenoj finiĝis nia restado en Ostrava. Ĝi konvinkis nin pri la vivanteco de nia junulara movado kaj pri la kapabloj de ĝiaj gvidantoj. La pluaj perspektivoj kaj laborplanoj estis skizitaj, ni kontrolu ilin dum la kunvenoj en Praha kaj februare en Brno.

Je la fino mi havas agrablan taskon adresi al la Ostrava junular-grupo kaj al ĝiaj gvidantoj nian dankon por la programoj kulturaj, instruaj kaj amuzaj, kiujn ili sciis prepari kaj harmoniigi por ĉies kontento.

Vlastimil Novobilský.

Rezolucio de la kunveno okazinta la 26-an de oktobro en Poruba:

1. Renovigi reton de lokaj kaj regionaj delegitoj, kiuj kunlaboros en la sekcio.
2. En ĉiuj esperantistaj grupoj ebligi al junaj samideanoj formi rondetojn de "Junularo".
3. Kulturi nian lingvon en la grupoj kaj someraj tendaroj, eduki novajn instruistojn, instrui laŭ A - B - C sistemo, kunlabori kun "Tagiĝo".

El la vivo de junularaj grupoj

OSTRAVA VŽKG (junularo). 17. 9. 1958 komenciĝis 2 kursoj por komencantoj. Aliĝis 46 interesuloj, instruas Vl. Slaný kaj Alena Zdražilová. La kurson daŭrigan, kun 14 gesamideanoj gvidas Radek Wolkovinský kaj Jiří Kolečka. En la konversacia kurso estas 12 ge-samideanoj.

16.10.1958 estis komencita elementa kurso en metilernejo de VŽKG. La unuan lecionon vizitis 45 knaboj 14 - 16 jaraj. Instruas Drah. Kočvara.

OSTRAVA ČSD (Přívov). 28.9.1958 estis aranĝita ekspozicio. 12 fervojistoj montris intereson pri Esperanto-kurso.

OSTRAVA - MICHÁLKOVICE. - post sukcesa jarkunveno 28.9.1958 komenciĝis elementa kurso. Ĉiuj 28 kursanoj, plej parte ministroj, havas triŝanĝan laboron, tial estas ĉiam instruataj 2 lecionoj: ekde la 17a ĝis 19a kaj ekde la 19a ĝis 20-a horo. Unu en la lecionoj estas ĉiam malnova. Instruas Vl. Kočvara.

OSTRAVA - PORUBA. 23.9.1958 loka grupo malfermis novajn kursojn anoncitajn per abundaj presitaj afiŝoj. 22 komencantojn instruas L. Adámek, progresintojn gvidas A. Hojdys.

DOLNÍ BLUDOVICE. - En la nova lerneja jaro aliĝis al nia pionira E-rondeto 34 geknaboj. La rondeto havas jam kvarjaran tradicion kaj ĉiujare estas pri ĝi granda intereso. La tutjara lerneja plano enhavas ĉiujare jenajn temojn: Ni fondos denove la Esperanto-rondeton kaj dum la Internacia tago de infanoj ni entreprenos Internacian sportkonkurson de esperantistaj lernejoj.

H A V Í Ř O V. - komence de la oktobro fondita nova, jam la tria kurso, kiun vizitadas 20 personoj. Kurskotizo 50 Kč (sen lernolibro). Ĉijare aranĝas ĉion Kleriga Kunularo, kiu samtempe havas kursojn de rusa (7 personoj), germana (15) kaj angla (11) lingvoj. Kurson por 20 ministlernantoj gvidis skde 8.10.1958 Josef Šlachta.

OSTRAVA - tramistoj. 20.10.1958 estis aranĝita aŭtuna kunveno de Ostravaj esperantistoj. Riĉa programo estis plaĉa, partoprenis 42 gesamideanoj. Tuta programo, al kiu kontribuis ankaŭ la Junularo, estis senbendigita.

ORLOVÁ. La uzina gazeto de la minejo A. Zápotocký "Hornický kahanec" el la 15.11. alportas fruntpaĝan anoncon pri publika prelego organizita de la esperantista rondeto. La anonco kaj same la prelego estas titolita "Pri Hiroŝimo". La prelegon kun diafilmo faris s-ano Janouš el Ostrava.

MÍSTEK. En la Uzina Klubo de Slezan aranĝis esperantistoj la III-an kuneston super la mapo de l' mondo je la temo "HINDUJO". Prelegis profesoro Ladislav Buzek, membro de la Societo por vastigado de politikaj kaj sciencaj konoj. Aldone estis projekciata filmo pri hinda arkitekturo kaj popoldancoj.

RÝMAŘOV. La kurson por 15 komencantoj gvidas Jiřina Temlíková, kiu novembre konatiĝis kun 2 siaj hungaraj gekorespondantoj vizitintaj Ĉeĥoslovakion.

BRNO. En EK Brno 11.11. la Junularo prezentis la programon "Ĉirkaŭ la mondon" (scenoj, recitado, kantoj).

STRÁŽNICE. Ĉe Uzina Klubo de "Šohaj" estis fondita nova E-rondeto kun 15 membroj. La kunvenoj okazas ĉiuŝaŭde je la 15,30 en ĉambro de la rondeto. La membroj krom lernado informas la publikon en Strážnice pri signifo de la lingvo internacia. Tiucele estas aranĝita unu montrofenestro. Prezidanto fariĝis D-ro Zdeněk Duchoň (Strážnice 918).

ŽDÁR nad SÁZAVOU. Esperanto-rondeto ĉe la Kleriga Domo eniras la kvinan jaron de sia agado. Klopodante starigi la Esperanto-movadon en la urbo sur firman bazon, la estraro decidiĝis reorganizi la kluban vivon. Krom la kurso elementa ĉiuj membroj nun kunvenas komune kaj ĝuas bonan programon antaŭe fiksitan kaj preparitan. Skeleto de la programoj:

19,30 - 19,50 prelego

19,50 - 19,55 novaĵoj el la movado kaj literaturo

19,55 - 20,15 amuza parto (kantoj, societaj ludoj)

20,15 - 20,30 lingva angulo.

Jen kelkaj temoj de aŭtunaj prelegoj: La fiaro en Leipzig, Prapatrujo de kafo, Leos Janáček kaj lia verkaro, Universala Kongreso en Majenco, Rembrandt van Rijn, Nederlando.

KRÁLÍKY. En oktobro estis inaŭguritaj kelkaj kursoj en la urbo: 1. ĉe OB, 2. en 11-jara lernejo, 3. en la internulejo de terkulturista lernejo. Oni klopodas penetri ankaŭ lernejojn en Letohrad kaj Žamberk.

DOLNÍ RADECHOVÁ. Tiun ĉi lokon vi malfacile trovos sur la landkarto, ĉar ĝi estas negranda vilaĝo apud la urbo Náchod. Fine de novembro tie fondiĝis E-rondeto, kies prezidanto estas la lernejo-direktoro s-ano Briksi. Aliĝis plejparte junularo, sed ankaŭ plenkreskuloj. Inter ili estas anoj de Loka Nacia Komitato. Esperanto estas instruata en la elementa lernejo. La rondeto serĉas kontakton kun eksterlandaj lernejoj por interŝanĝi infanajn desegnaĵojn, bildkartojn k.s. Junaj geamikoj, skribu al la adreso: Květa Bořková, oficistino, Dolní Radechová, p. Náchod, Ĉeĥoslovakio.

NÁCHOD. - Esperantista rondeto ĉe Uzina Klubo de la fabriko MEZ - Náchod aranĝis en la tagoj de 5-a ĝis 12-a de Oktobro propagandan ekspozicion en sia klubejo. Ĝi estis titolita "Praktika uzado de ESPERANTO. Ekspoziciitaĵoj: Libroj originalaj kaj tradukitaj, diverslandaj gazetoj kaj korespondaĵoj (vidajkartoj, leteroj, bele afrankitaj kovertoj), konciza skizo pri Esperanto, diverslandaj propagandaj faldprospektoj Esperantlingvaj, afiŝoj de UNESCO, poŝtmarkoj, Esperanto-glumarkoj, fotografiaĵoj pri Internaciaj Esperanto Tendaroj kaj Kolegioj okazintaj en Ĉeĥoslovakio, fotografiaĵoj de eksterlandaj korespondantoj kaj diversaj akiritaj aŭ ricevitaj pere de Esperanto aŭ rilatantaj al ĝi. Speciala atentigo estis pri Varsovio - urbo de la venontjara 44-a

Universala Kongreso de Esperanto.

Estis sonbendigita duhora propagandprogramo (parolata vorto kaj muziko) kaj disaŭdigata, pere de magnetofono kaj laŭtigilo alfiksite ekstere en strato, ĉiutage dum enirebla tempo. Ĉiun duan tagon la programo estis ŝanĝata, por ke ĝi fariĝu denove interesa.

La ekspozicion vizitis 285 pagintaj homoj, infanoj estis enlasataj senpage. Ĝi antaŭiris kurson, kiu estis malfermita tuj post ĝia finiĝo kaj aliĝis 20 homoj, kiuj ĝis nun partoprenas regule. La ekspozicio ankaŭ influis kurson por komencantoj en Dolní Radechová (3 km-jn de Náchod), al kiu aliĝis 37 interesuloj, inter ili ankaŭ prezidanto kaj sekretario de Loka Nacia Komitato kaj direktoro de loka elementa lernejo.

CHRUDIM. - Ni transiris el Kleriga Domo en Uzinan Klubon de Transporta. La 1.10. malfermita kurso por komencantoj en "Státní pracovní zálohy" (11 ĉeestantoj). La 6. 12. ni aranĝos en ejoj de la Klubo Nikolaan vespereton. Dum decembro ni aranĝos tri ekspozicio pri Esperanto. En januaro ni intencas aranĝi kurson en la urbo.

STRAKONICE. - En monato oktobro komenciĝis nova kurso en Strakonice. La kurson vizitas 15 homoj. Ni preparis paroladon kun filmo pri Albanio, kiun vizitis ankaŭ multe da neesperantistoj. Prelegis s-ano Křivánek el Písek.

En ĉeĥlingva "Kultura Kalendaro" estis publikigita artikolo "Por alvoko de prof. D-ro Albert Schweitzer", kiu mencias peran servon de Esperanto.

ÚSTÍ NAD LABEM - al la esperantistaj rondetoj aliĝas nova grupo en Ústí nad Labem. Fakte ĝi ne estas nova, ĝi nur relevis la tradicion - portempe rompitan - kiu havis sian ekeston jam antaŭ 25 jaroj.

Pasintjara kurso, gvidata de la mortinta L. Jonášová edukis 8 gesamideanojn, kiuj estas kerno de la grupo. Ĉi-jare oni aranĝis kurson por komencantoj (20 personoj) kaj por progresintoj (12 personoj). Ambaŭ kursoj okazas samtage (merkrede je la 18-a horo en Pánská 19), sed aparte kaj ni unuiĝas nur por la lasta duonhoro, kiam ni kune kantas, amuziĝas kaj aŭskultas pri diversaj travivaĵoj de niaj membroj.

Laŭ nia opinio nia Uzinkomitato estu modelo por la aliaj. Ĝi disponigis al ni ne nur du hejtitajn ĉambrojn, bele ekipitajn, sed ankaŭ radioaparaton, gramofonon, projekcian aparaton kaj magnetofonon.

Al la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato ni volus adresi peton pri morala kaj alia helpoj kaj ni esperas, ke al nia voĉo aliĝos la aliaj kaj ke ni ne estos neaŭskultataj! Ni bezonas lernolibrojn, vortarojn kaj tion, kio povus en eksterlando firmigi nian bonan reputacion - nome la gazeton laŭ ekzemplo de la Nuntempa Bulgario.

Se inverse la Ĉeĥoslovaka E. Komitato bezonas nian helpon, ni estas ĉiam ag-pretaj.

La laboron de la grupo gvidas ĝia trimembra komitato, kiun formas s-anoj Kűchler, Jonáš kaj Gubiš.

Kűchler - Novobilský.

OSTROV N/OHŘÍ - la rondeto organizis en septembro Esperantan ekspozicion, kiu vekis grandan intereson. La 4-an de oktobro komenciĝis trimonata kurso, kiun vizitas 16 gelernantoj.

Adreso de la rondeto: Jindřich B r a n k y t l
ul. S. K. Neumanna na 985/27
Sídliště - Ostrov n/Ohří.

Regiono PLZEŇ. La raportoj pri organizado de la kursoj venis el Plzeň, Chotěšov, Plasy. En Kralovice la movado dume stagnas.

Informa cirkulero de s-ano J. Sladký sendita al la grupoj enhavas kelkajn tre bonajn instigojn.

En la grupoj elkrei diversajn interes-rondetojn, ekz. literaturan, tradukistan, historian,

lingvan, stenografian, estradan k. a.

Labori laŭ plano antaŭe fiksita almenaŭ por kvaron-jaro.

Altigi la lingvan nivelon. Gajni novajn talentitajn gejunulojn, kiuj sin preparus por D-ekzameno (porinstr.).

Serĉi novajn metodojn de efika, sed serioza propagando.

Proponas aranĝi regionan seminarion por la lokaj delegitoj kaj prezidantoj de la lokaj grupoj.

La regionan kunvenon junularan 3.9. partoprenis 22 samideanoj. Ekster Plzeň venis s-anoj el Plasy, Stříbro kaj Nýřany. Estis tie diskutata laborplano por la jaro 1958-59. La funkcion de regiona delegito daŭrigos s-ano J. Sladký ankaŭ en la nova jaro.

ALVOKO 1 Kial ni ne okazigas regule post la elementa kurso la daŭrigan? Ĉu mankas kapablaj kursgvidantoj, lernolibroj, instruhelpiloj, kursanoj? Ni malfermu diskuton pri tiu ĉi temo en la Tagiĝo, ĉar kvalito de nia estonta laboro dependas de ges-anoj, kiujn ni hodiaŭ edukas.

La grupoj, kiuj havas la kurson por progresintoj, sciigu viajn spertojn pri la instrumentadoj kaj pri la lecion-enhavo! Ĉu vi uzas ekskluzive Esperanton aŭ nur parte, el kiu fonto vi studas la gramatikon, kiujn legotekstojn vi uzas, kiel vi amuziĝas, ĉu vi kolektive korespondas?

Respondojn al tiuj ĉi kaj aliaj demandoj sendu al VI. Novobilský, prom. chem., Ústí n. L., Na vlnovce 3, kiu gvidos la diskuton.

ALVOKO 2 Estis fonditaj junularaj studrondetoj de Esperanta gramatiko, literaturo, historio. Junaj gesamideanoj, kies koncernaj scioj respondas al la junulara D-ekzameno kaj deziras daŭrigi la studadon sub direkto de spertaj esperantistoj, aliĝu ĉe J. Werner (Ostrava-Kunčice, Na Lachu 6.) La gramatikistan rondeton gvidas J. Werner, la literaturan VI. Novobilský, la historian J. Mařík. La postuloj ne estos malaltaj. El la studantoj estas elektotaj instruistoj por la Someraj Tendaroj.

El la leteroj de niaj amikoj =====

Skribas al ni dro Edmond PRIVAT. . .

La Someraj Esperanto-Tendaroj povas fieri pri la riĉa enhavo de siaj instru-lecionoj. Jam en la unua tendaro (1952) ni instruis krom la gramatiko ankaŭ la literaturon kaj historion de Esperanto. De jaro al jaro la nivelo kreskis. Subite ni eksentis, ke mankas al ni detala gvidlibro pri la historio de la Esperanto-movado en niaj ĉefaj kaj slovakaj landoj. Kuraĝa penso - kaj s-ano dro S. Kamarýt ricevis de ni leteron, en kiu ni petas lin pri prilaboro de tiu ĉi temo. La rezulto estas konata dro Kamarýt entuziasme entreprenis la laboron kaj ĝuste antaŭ sia morto li finis imponan historian verkon pri la evoluo de la E. movado en niaj landoj.

Ĉi-jare en la tendaro apud Žimrovice ni diskutis en unu literatura leciono verkon de dro Edmond Privat "Historio de la lingvo Esperanto". Ĝi estas la ĉefa prihistoria lernolibro en niaj tendaroj. Plejparte laŭ ĝi estis kompilita la tendara Manlibro pri la E. historio de s-ano J. Mařík. Sed la libro de E. Privat finas la priskribon en la jaro 1927. Iu ĝemis: "Kiom da jaroj, kiom da okazintaĵoj, kiel granda neplugita kampo". Iu faris proponon - kaj mi en la nomo de la ĉeĥoslovaka junularo sendis leteron al dro Edmond Privat en Neuchâtel. Mi klarigis - la situacion de niaj junularaj tendaroj kaj demandis ĉu ni povas esperi eldonon de la tria historia volumo, kiu traktus la periodon 1927-1958. Dro E. Privat respondis al mi:

Kara samideano,

kore mi dankas pro via tre afabla letero kaj mi petas vin transdoni mian amikan saluton al la esp. junularo kun miaj plej bonaj deziroj por la sukceso de iliaj kunvenoj. Per la penso mi estas kun vi. Bedaŭrinde kruela koks-artrozo tre suferigas kaj lacigas min. Kun granda peno kaj kiom eble plej multe da kuraĝo mi komencos mian lastan jaron ĉe la universitato kaj dubas ĉu mi povos ankoraŭ iam verki, eĉ se mi plu vivos. Mi klopodos vojaĝi ankoraŭ al tiu ĉi kongreeo por honori la memoron de mia amiko Hodler.

Dankon al la junuloj, kiuj reprenas la movadon. Tutkore via Edmond Privat.

Mi firme kredas, ke la malsano ne venkos kreajn fortojn de dro Privat kaj ke el lia plumo ni tamen ricevos verkon, en kiu li ordigos ŝajne kaosajn okazintaĵojn, kiajn vivis Esperantujo de 1927. Mi kredas, ke li per sia patosa - poeta stilo kreos senmortan monumenton de nia afero, kiu

STUDENTA TUTMONDA ESPSRANTISTA LIGO (STELO)

Esperanto venkos, kiam ĝi akceptiĝos en ĉiuj lernejoj. Por gajni la lernejojn, ni devas gajni la universitatojn, kiuj forte influas la instruistaron. Gajni la universitatojn ni povos nur, kiam ekzistos forta studenta organizo.

Ni do aparte ĝojas anonci, ke dum la 43-a U.K. en Majenco fondiĝis la Studenta Tutmonda Esperantista Ligo, kiel studenta sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE).

Aktiva membro povas fariĝi ĉiu esperantisto, kiu studas (aŭ studis ĝis antaŭ du jaroj) en universitato aŭ samranga, institucio. Apoganta membro povas fariĝi ĉiu alia jura aŭ fizika persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi al la Ligo. (Pro la valutaj malhelpoj ne eblas el nia lando pagi la kotizon de 4 steloj kaj 13 stelojn por la gazeto "Esperantista Studento").

STELon prezidas Paul Ciliga el Parizo, sekretario estas John C. Wells, Trinity College, CAMBRIDGE, Anglujo.

SVEDA ESPERANTISTA JUNULARA UNUIĜO

fondiĝis en Nybro dum la jarkongreso de Sveda Esperanto-Federacio kaj havis sian unuan ordinaran kunvenon en la kadro de la SEF-Kongreso en Gotenburgo (Göteborg). Prezidanto estas Nils Erik Kristoferson, Zederslunds - gatan 11 B, MOTALA, Svedlando.

POLA ESPERANTO-JUNULARO

kiel sekcio de Asocio de Esperantistoj en Pollando estis kreita en la XV-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso, okazinta la 20-21-an de septembro 1958 en Krakovo.

LA 15-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO de TEJO

okazos en GDAŃSK 24-31. de julio 1959 (unu semajnon antaŭ la 44-a U.K.). Estis jam kreita Loka Organiza Komitato, kiu baldaŭ aperigos informan bultenon. Adreso de la komitato: 15-a IJK de TEJO, Loka Organiza Komitato, str. Garncarska 18, Gdansk, Pollando.

POLLANDO ANTAŬ LA KONGRESO.

Preparoj por la 14-a Kongreso en Varsovio alportas kune rimarkindan levigon de la enlanda movado. La intereso pri Esperanto kreskas. Polaj ĵurnaloj ofte skribas pri ĝi. "Sztandar Młodych" n-ro 2 (23.9.) raportas:

Nedeviga lernado de Esperanto estos enkondukita en multajn lernejojn, precipe teknikajn, poŝtajn, hotelajn. . .

Instruistaj institutoj enkondukoe Esperanton por prepari instruistojn de tiu lingvo.

Pola Radio baldaŭ komencos instruadon de Esperanto en la enlandaj programoj kaj por eksterlando ĝi disaŭdigos en Esperanto.

En Gdansk estas konstruata marŝipo, kiu portos nomon "Esperanto". La ŝipo estos preta en la jaro 1959. La ŝipanaro parolos Esperante.

"Kurier Polski" n-ro 230 (2.10.) raportas, ke la Filologia Instituto en la Societo de Scienco Universala fondis la sekcion de Esperanta filologio kun universitata programo lingvistika kaj filologia: studado de Esperanto, korespondado en eksterlanda komerco, historio de lingvoj internaciaj, Esperanta literaturo, arthistorio. La sekcio havas sidejon en Palaco de Kulturo kaj Scienco, XIII-a etaĝo, ĉambro n-ro 1347. Studi eblas kiel ordinara studento aŭ distance.

"Kulisy" n-ro 39 (28.9.) informas, ke ĉe la redakcio de tiu ĉi revuo fondiĝis la Klubo de la amikoj de Esperanto "Amika Servo". Ĝia programo estas jena:

Korespondi en Esperanto pri ĉiuj temoj kun esperantistoj el la tuta mondo, interŝanĝi ĵurnalojn, revuojn, poŝtmarkojn, sportinsignojn, fotojn, gramodiskojn, amatorajn filmojn, bildkartojn, alumetajn etiketojn, albumojn, librojn, kantojn ktp, organizi esperantistojn en rondetoj de muziko, flanco, kantado, arto, lingvoscienco, organizi turismajn ekskursojn ktp. La Klubo disponas per la servoj ankaŭ al eksterlando. La anoncetoj de la Klubo aperas pollingve en la ĵurnalo

"Kulisy". Adreso: La Klubo de la amikoj de Esperanto, Mgr. M. Zgórzewski, WROCLAW 2, skr. poczt. 22, Pollando.

Por la 44-a Kongreso venis jam kelkcentoj da aliĝoj. Rilate al la nunjara kongreso en Majenco, kie estis 2144 kongresanoj el 39 landoj, la nombro de aligintoj al Varsovio promesas eĉ pli grandan ĉeeston.

(Laŭ raportoj de s-ano J. Rezner - Giuchoiazy).

TRIA INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Majenco – Gonsenheim 2-9 Aŭgusto.

Laŭ ĵurnaloj kaj radiaj raportoj ĝi estis unika okazintaĵo en la mondo, kvankam ĝi arigis nur 30 infanojn el naŭ landoj: Britujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Jugoslavio, Nederlando, Svedujo kaj Svislando.

Krom ludoj, kantoj, slojdo k. a. la infanoj ekskursis al Frankfurt, Rüdesheim kaj Bingen. La etuloj mem helpis prepari programe la vizitotagon, en kiu preskaŭ 250 kongresanoj travivis belajn momentojn dum la infana kantado, dum prezentado de fabelo "Neĝulino", pupteatro kun heroo Kaspreto en sorĉa komedio originale verkita por la Kongreseto. Ĝi finiĝis per adiaŭa balo. J-er

ALVOKO DE "GRAJNOJ EN VENTO" AL TUTMONDAJ GEINSTRUISTOJ KAJ GVIDANTOJ DE ESPERANTO-KURSOJ POR INFANOJ.

De jam tri jaroj funkcias la infanaj rondoj "Grajnoj en Vento". Ankaŭ via klaso, via grupo devas koni la ĝojon partopreni en nia lerneja riĉoplena interŝanĝo. Dank' al kunlaboro en rondo Grajnoj en Vento, per unu fojo vi kontaktiĝas kun multaj klasoj en diversaj landoj. En marto, junio, novembro, ĉiu rondo eldonas novan kajeron kun riĉa enhavo de infanaj verkoj. La formato de la kajeroj, por ĉiuj rondoj estas normaligita je 21 a 29,7 cm, kio ebligas okazan kunlaboradon kun najbara rondo.

La rondoj Grajnoj en Vento ne prizorgas privatan korespondadon inter infanoj, sed nur eldonas de infanoj libere kaj originale verkitajn tekstojn kaj desegnaĵon. La eldonnombro estas 20 ekzempleroj.

Tiaj altvaloraj kajeroj kontribuas

- x al interamikiĝo de tutmondaj infanoj.
- x al disvastiĝo de Esperanto ĉe la geknaboj
- x al enkonduko de Esperanto en la lernejojn
- x utilas kiel propagandiloj kaj atestiloj pri la valoro de la internacia lingvo.

Bonvolu skribi al ĉi-suba adreso:

a/ Mi deziras kunlabori en via entrepreno, sendante 3-foje jare tekstojn kaj desegnaĵojn po 20 ekzempleroj.

b/ Mi deziras kunlabori en via entrepreno kaj estas preta funkcii kiel gvidanto de nova rondo.

Adreso:

GRAJNOJ EN VENTO, Marcel Erbeta, rue des Pins 66,

Bienne-Biel 7, Svislando/Suisse.

UNUA MANLIBRO DE ĈEĤA-ĈINA KONVERSACIO.

Ĵus aperis en Peking la unua manlibro de ĉeĥa-ĉina konversacio. Kiel estas presite sur la libro, ĝia aŭtoro estas D-ro Sawa Ch's'man (Saŭa Ĥ-a-man), kio signifas en komprenebla ĉeĥa lingvo: d-ro Sáva Heřman.

Ni gratulas al la aŭtoro pro tiu faro, des pli, ĉar li estas membro de la Esperantista Klubo en Praha. Jm

LA SUDA STELO,

literatura gazeto eldonata en Jugoslavio, eldonos apartan ĉeĥoslovakon numeron. Ĝian redakton transprenis s-ano Jiří Kořínek. Krom tradukoj el la poeziaj kaj prozaj verkoj ĉeĥaj kaj slovakaj aperos tie ankaŭ originalaĵoj de niaj aŭtoroj kaj intervjuo kun Eli Urbanová.

NOVDATAJ TRADUKOJ EL LA ĈEĤA POEZIO.

Laŭ la priliteratura prelego, kiu estis prezentita de s-ano Novobilský en Ostrava okaze de la Interbabilado, evidentiĝis, ke krom unuopaj tradukoj de poemoj oni tradukas ankaŭ kompletajn verkojn. S-ano Jiří Kořínek tradukas por Verda Ĉaro de Julio Baghy elstaran verkon de Vítězslav Nezval "Manon Lescaut". El Jugoslavio oni anoncis, ke oni eldonos "Panjon" de Jaroslav Seifert en la traduko farita ankaŭ de S-ano J. Kořínek. Konata romano de la nacia artisto Fráňa Šrámek "Arĝenta vento" estas tradukata de profesoro Jaroslav Mráz.

JULIE ŠUPICHOVÁ: "LA JUNA KORESPONDANTO"

Tiu ĉi verketo tre valora por novaj samideanoj aperis en septembro 1958 en Varsovio. Eldonis ĝin la Asocio de Esperantistoj en Pollando.

Por la senlaca, fervora laboro de nia kara samideanino Julie Šupichová, amikino de nia junularo, ni elkore dankas kaj gratulas.

NI ELKORE GRATULAS AL S-ano JAROSLAV MAŘÍK,

estinta ĉefdelegito de la ĉeĥoslovaka E. junularo kaj redaktoro de "Tagiĝo", kiu estis elektita kiel prezidanto de la E. klubo en Praha.

Vítězslav Nezval:

MONOLOGO DE MANON

el la sepa sceno de la versdramo Manon Lescaut

Kial, ke mi, Manon,
feliĉas tiel, ho?
Kial, ke mi, Manon,
al ĉiuj plaĉas do?
Per kio mi impresas?
Ili ne interesas,
krom unu, krom unu, krom unu, . . .

Kial, ke mi, Manon,
atentas ilin plu?
Kial, ke mi, Manon,
mokas ilin kun ĝu'?'
Ĉiu promesojn lanĉas,
sed al mi, al mi plaĉas
nur unu, nur unu, nur unu,

Kial, ke mi, Manon,
nur deksejarulin',
kial, ke mi, Manon,
el mond' cedigu min.
Ja kurtas vivo rara,
aĥ, estas viv' la kara
nur unu, nur unu, nur unu. . .

Tradukis Jiří Kořínek

LASTMOMENTAJ INFORMOJ EL BULGARIO:

En la ĉefurbo Sofia nun funkcias 28 kursoj por ellerno de Esperanto. En lernejoj kaj superaj institutoj de tiu ĉi urbo studas la internacian lingvon pli ol 120 gejunuloj.

Lastatempe en multaj urboj en Bulgario ĉe esperantistaj societoj estis fonditaj junularaj grupoj.

Multe da bulgaraj gejunuloj ellernis Esperanton per la korespondaj kursoj organizitaj de la ŝtata entrepreno "Vseatranni uslugi", bul. Dondukov 51, Sofia. De du jaroj la sama entrepreno aperigas kurson por progresintoj.

La eldonejo de la Ŝtata Komitato por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando eldonos en Esperanto la romanon "Bofilino" de Georgi Karaslavov. La libro aperos en 5000 ekzempleroj kaj nun ĝi estas tradukata.

Poŝta adminiistracio en Bulgario eble denove eldonos Esperantan poŝtmarkon, se oni konstatos intereson. Skribu al: Ministerio de la transporto, Filatela Servo, Sofia, Bulgario.

N. Nikolov

ESPERANTISTA SKI-SEMAJNO EN BULGARIO okazos 2. - 9. de februaro 1959 en montaro Vitoŝa apud Sofio. Post taga skiado la partoprenontoj aŭdos kelkajn interesajn prelegojn. Por perfektigi oni tie parolos nur Esperante. La restadon en turista montar-domo aranĝas Junulara Sekcio de BEA.

LINGVA ANĜULETO

PRI NEOLOGISMOJ

Kiel promesite, ni skizas en la hodiaŭa numero la problemon de neologismoj en Esperanto. Laŭ voĉoj de la diskutintoj ĝi ŝajnas esti danĝera, preskaŭ ĉiuj sin esprimas kontraŭ tiu ĉi modernisma tendenco.

Pluraj skribas en tiu ĉi senco: ...la Fundamenta Esperanto de Zamenhof sufiĉas plene kaj riĉe por la hodiaŭa mondo kaj sufiĉos por ceteraj 50 jaroj s e n superfluaĵ, spasme elpensitaj "plibonigoj". (Inĝ. V. Jonáš).

S-ano Kl. Naudzius el Kaunas (Litova SSR) atentigas interalie pri danĝera influo de la okcidentaj lingvoj, pri anglismoj de niaj anglaj poetoj, francismoj de la francaj verkistoj en Esperanto, ktp. "Estas sufiĉe, se oni trafolumas almenaŭ unu numeron de La Nica, ke oni konvinkiĝu, kiom da necesaj neologismoj tie svarmas sub la "Glosoj". Jen: roĵo – rivereto, negi - nei, dista - malproksima, lontano - malproksimaĵo, brasi - bierfari, primavero - printempo ktp. ktp. Kial do iu slavo anstataŭ "printempo" ne povas uzi sian "vesno", aŭ germano anstataŭ "malproksima" - "entfernta" k.s.! ... Ni ekvidu, kian servon kaŭzas ĉi tia "riĉigo" por la esperantistaro de la Sovetia tendaro - tieaj esperantistoj tre nevolonte prenas por legi eldonaĵojn okcidentajn pro tiu svarmo de novaj kaj nekompreneblaj vortoj. Personoj posedantaj Plenan Vortaron (ankaŭ ja nesufiĉan por "deĉifri" ĉiujn nunajn neologismojn) tie estas kalkulataj fingronombre; alia lingvokona literaturo ankaŭ mankas. Kiel do ili povas venki la barojn kaj imagi la "grandan rondon familian", se jam la okcidentaj verdsteluloj mem plendas, ke sen naciaj vortaroj ili ne kapablas legi tian aŭ alian literaturon Esperantan. Kion utilas ĉi tia stato? . . . "

La rilato kontraŭ-neologisma estae diversgrada. Neniel konsenti mi povas kun la opinio, ke sufiĉas la vort-radikoj de la Fundamento. Nepe ne sufiĉas la vortoj oficialaj kaj oficialigitaj kune. Ĉiu aserto pri sufiĉo de la vortprovizo, kiu bazas sur kiu ajn vortaro aŭ listo de vortoj, estas kontraŭlogika, estas kontraŭ principoj de vivanta lingvo. Ligi lingvon firme al vortaro signifas igi la lingvon morta. Neprave kelkaj legantoj same komprenas la esprimojn "Fundamenta Esperanto" kaj "Zamenhofa Esperanto". Parolante kontraŭ neologismoj ili rekomendas teni sin ĉe Esperanto Zamenhofa, kiu mem ofte uzadis neologismojn. Eĉ hodiaŭ, post apero de 6 Aldonoj al la Universala Vortaro restas ankoraŭ multaj Zamenhofaj vortoj neaprobataj. D-ro Zamenhof, kies lingvan intuicion rekonas eble ĉiuj esperantistoj, montris al ni, ke la lingva evoluo signifas ankaŭ akceptadi novajn radikojn. Zamenhof tradukante la klasikajn verkojn de la mondliteraturo, kaj speciale

Hamleton de W. Shakespeare, ne povis uzi nur 2666 (aŭ 2723?) vortojn el la Universala Vortaro (en la j. 1905), modifante ilin per la afiksoj kaj kunmetado. Ne sufiĉas ja traduki nur la sencon, sed ankaŭ atmosferon, impresojn. Ampleksa vortaro de Shakespeare k.a. postulas nuancigojn ankaŭ en Esperanto. Ne estus ĝuste riski literaturan valoron de la tradukoj. - Cetere estas konata verko de Paul Boulet "Du mil novaj vortoj ĉerpitaj, el la verkaro de D-ro L. L. Zamenhof netroveblaj en Universala Vortaro".

Antaŭ kelkaj jaroj aperis en Praha verko de Jiří Machovec "Logika" (en la ĉeĥa). En unu ĉapitro la aŭtoro kritikas lingvojn internaciajn, ankaŭ Esperanton, ke ili estas kolektoj de vortoj kun skematike fiksita senco, ofte tro larĝa, malhavantaj preskaŭ-sinonimojn ktp. Diference de ili la lingvoj naciaj povas esprimi ĉiun nuancon, ekzemple (rimarkas J. Machovec) en la ĉeĥa: bolest, žal, žalost, utrpení. . . . entute 13 preskaŭsinonimoj. En la bulteno de Esperantista Klubo en Brno s-ano Jiří Kořínek tiam refutis tiun ĉi aserton kiel malpravan kalumnion kaj elkalkulis 27 tiusencajn preskaŭsinonimojn.

Kompreneble estus peko elpensadi neologismojn nebezonatajn. Estas do necese ĉiam objektivite kaj kritike esplori, ĉu ekzistas jam vorto por la koncerna nocio, ĉu la vorto estas necesa, aŭ eblas la nocion sufiĉe esprimi per kunmetaĵo aŭ metaforo. (Pri faklingvoj vidu "Lingvan anguleton" en la 41-a Tagiĝo).

Nun Esperanto estas jam tiom riĉa, ke la serĉado de novaj esprimoj estas afero preskaŭ nur de fakaj terminaroj, kie devas speguliĝi la evoluo de sciencoj kaj la tekniko. Krome tie validas la regulo, ke ĉiu nocio havu nur unu esprimon. Homonimoj kaj sinonimoj ne estas dezirataj, ĉar la lingvo devas esti unuavice klara, ne varia.

Multaj utilaj vortoradikoj ne estas ankoraŭ aprobitaj, ili estas uzataj kiel neologismoj (Plena Vortaro kaj ĝia Suplemento ne signifas oficialigon!) kaj batalo kontraŭ ili estas batalo kontraŭ Esperanto mem. Temas ekzemple pri la vortoj cititaj de F. Faulhaber en "La Progresanto" n-ro 12 (1957), pĝ. 89: demoralizi, diskrediti, partizano, staplo, rapsodio, tombolo, valuto (ĉiuj Zamenhofaj) kaj: aspirino, buldozo, celofano, devaluti, difterio, elektrono, fascini, gabardino, garaĝo, helikoptero, hormono, insulino, kakia, mentolo, mitralo, nilono, penicilino, plasto, slogano, reversi, erodi, vitamino, viskoso, viruso, reaktoro, sero, roboto, saboti, stencilo ktp. ktp. Samloke estas menciita trafa ekzemplo, kiam Fundamenta vorto ne sufiĉas. BLEKI signifas "krii (de bestoj)". Bleki do estis por kiu ajn sono de kiu ajn besto. Estis necesa precizigo. Sed ĉevalbleki, ranbleki ktp. ne estie praktike uzeblaj. Ĉu "žáby kvákají" traduki "la ranoj ranoblekas"? Citite: "Sed en la sama Univeralea Vortaro Zamenhof donis la vortojn BOJI (de hundo) kaj PEPI (de pasero kaj kokido). En siaj verkoj li uzis KLUKI (de kokino) kaj MIAŬI (de kato) - ambaŭ poste oficialigitaj - kaj GRUNTI (de porko), KVAKI (de rano), ĈIRPI (de cikado), kiuj ankoraŭ estas neologismoj, same kiel HENI (de ĉevalo), MEKI (de kapro), KOKERIKI (de koko), ULULI (de strigo kaj lupoj) de aliaj verkistoj. "Tiujn ĉi neologismojn F. Faulhaber opinias oficialigindaj. Simile indas precizigi vicon de aliaj objektoj, agoj kaj ecoj.

Alia sinteno estas necesa en kazo de neologismoj superfluj, kiam por la sama nocio ekzistas ekvivalento jam enkondukita; oficiala aŭ oficialigita. Ekzistas multe da tiaj duoblaĵoj, kiuj ne estas necesaj kaj povas esti nomataj balasto de la lingvo, (ekz.: pado, prizono, ekspliki, hasti, disipi, infra, dura, ĉiuj ceteraj ekvivalentoj de mal-vortoj k.a.). La teorio pri nedezirata elvokiveco de mal-vortoj laŭ G. Waringhien iom pravas (ekz.: malbela tago elvokas ideon de bela tago, kiun la prefikso nesufiĉe forpelas), sed preskaŭ ne estas grava por ni. Tial ĉiuj verkistoj, redaktoroj kaj ceteraj esperantistoj, kiuj ne havas specialajn artismajn aŭ psikologiajn kaŭzojn por la uzo de tiuj ĉi vortoj, ne risku kompreneblon de via verko kaj parolo. Ĉu vi ne deziras, ke via verko estu ŝate kaj vaste legata kaj komprenata? Ĉu vin ne interesas fina normiĝo de ĉiutaga lingvo? Kial kompliki ĝin per superflujaj neologismoj, aŭ eĉ per neologismoj sciencaj kaj teknikaj (terminoj), kiujn vi ofte miksas kun vortoj de parola Esperanto. Konsciu ja, ke neniu esperantisto scias la tutan Esperanton, ĉiujn fakajn terminarojn. Tiaj geniuloj ne naskiĝas kaj ne ekzistas ankaŭ en fteroj de lingvoj naciaj. Ju pli klera homo, des pli da vortoj ĝi konas, sed neniam ĉiujn vortojn.


Mi rekomendas taksu la problemon objektivite. Kaj ne nur la problemon, sed ĉiun neologismon aparte, ĉar unuj estas akceptindaj, la aliaj forlasindaj aŭ uzeblaj nur en la faka

literaturo aŭ medio. La evoluon de Esperanto direktas ni, la uzantoj. Ni do estu prudentaj kaj ne sindonu al la fluo de moda originaleco. Sed same la tereno de "puraj fundamentistoj" ne estas por ni.

Jan Werner

Ni gratulas al Luba Travěncová, antaŭe Zabadalová, kaj al ŝia edzo Igor, kiuj anoncis al ni sian geedziĝon.

Vojaĝo por sonĝo en puto



La 12-an de oktobro forveturis grupeto de entuziaamaj gejunuloj el Opava al vilaĝo Úvalno. Tie ili daŭrigis la vojaĝon al la kastelruino Cvilín (alinome Lobenstein, Šelenburk) kaj ne supozis, ke ili travivos multon interesan.

Unua interesaĵo estis jam apud Úvalno, kie estas historiaj elfosaĵoj de eksa tombejo. Sur ĉi loko estas en malnovaj tomboj homaj skeletoj, ujoj, kiujn uzadis homoj antaŭ kelkaj centjaroj, k.s. Laŭ materialo, el kiu estas la ujoj ellaboritaj, oni povas konstati ilian aĝon. Gvidanto Pepek trafe ĉion klarigis kaj rekomendis al vojaĝantoj preni iun oston hejmen - "por rememoro". Dua haltiĝo estis apud Rigardoturo de Libereco (Rozhledna svobody), kiu estis konstruita je memoro de Hanuš Kudlich. La

grupestro instruis nin, ke la urbano de Krnov, Hanuš Kudlich helpis al la silezia popolo rilate servutnuligon (1848). Sed vojaĝantoj ne nutris sin nur per historiaj faktoj, ankaŭ per belega naturo, sunbriligita, radianta per aŭtuna kolorabundo, kantanta per susuro de pinioj, kverkoj, piceoj kaj tremoloj. Paradizo por fotoamatoroj. Certe taŭga regiono por geamantoj, ĉu ne? Sed niaj vagantoj jam devis rapidi tra arbaro al la kastelruino Cvilín, ĉefcelo de la vojaĝo. Pepek gvidis nian grupon voje-nevoje, tial en profundetaj partoj de arbaro ni trovis diversajn bel-aspektajn plantojn, strangan serpenteton kaj interesajn fungojn: violkolorajn trikolomojn, blankajn kampajn agarikojn, ruĝkapajn silikboletojn kaj brunkolorajn boletojn, ombrelaspektajn agarikojn ktp. Kiom riĉa estas la naturo! Kaj la homo amas ĝin des pli multe, ju pli profunde ĝin konas. Kiel rapide la vojaĝo forfluis! Vagantoj jam estas gastigataj en ruinkastelo Cvilín - sed nur per sia propra provianto. Unu junulo jam havas pro la vojaĝo kaj malsato truan stomakon kaj neniu scias lin satigi. En lia stomako malaperis ĉiuj rostitaj kokidoj, kolbasoj, ovoĵoj, kukoj, kukumoj kaj ĉio manĝebla. Kaj fine li ekhavis teruran ideon malsupreniĝi en grandan profundan puton de la ruinkastelo por trarigardi ĝin. Ho ve, kia perdo estus, se... - pro la rostitaj kokidoj. . . Vere, ŝerco sekvis ŝercon kaj la vojaĝo preskaŭ finiĝis. Kun poŝoj plenaj de fungoj ni direktis al fama baroka preĝejo kaj rigardoturo sur monteto Cvilín, observis ĉirkaŭaĵon kun la urbo Krnov, ŝtata limo kaj kun la vilaĝo Cvilín. Gejunuloj poste rapidis al vagonaro, kiu veturigis ilin en Opavon. Ĉiuj estir animfreŝaj, gajaj, entuziasmitaj de belegaj travivaĵoj.

Sed ĉio havas finon. Nur nokta sonĝo ĉion revivigas kaj vualigas per strangaj koloroj: ho, Pepek ridas en la profunda puto, en unu mano li havas rostitan kokidon kaj en la dua mano skeleton de mortinto el Úvalno. Li ekstaras kaj komencas prelegon por esperantistoj pri boletoj kaj agarikoj...

Serpentino

Esperanto en lernejoj

Redaktas O. Schwetter, Havířov I., Sadová 7, al kiu sendu ĉiujn sciigojn, kiuj rilatas E-movadon en lernejoj.

Ofte oni aŭdas: "Mi intencas enpenetri lernejon, sed mi ne scias kiamaniere!" Do, hodiaŭ mi volas transdoni al vi miajn spertojn. Unue mi respondos demandon, kiun mi ofte aŭdas: "Ĉu estas hodiaŭ permesite instrui Esperanton en lernejoj?" Se vi trovos taŭgan formon - jes. Ĝi estas la formo de interesrondetoj, kiujn oni povas fondi en ĉiuj lernejoj laŭ interesoj de lernantoj.

Ŝajnas al mi, ke plej facile tion povas fari la instruistoj, kiuj instruas en la koncerna lernejo, ĉar ili tie bone konas la medion. Kiu havas pli bonan kontakton kun infanoj ol vi - instruistoj? Mi ne kredas, ke vi estas tiaj nekapabluloj, kiuj ne povas akiri geknabojn por la afero. Ne estu maldiligentaj kaj ĉefe ne timu, ke iu persekutos vin. Estas tamen la devo de ni ĉiuj, ke ni eluzu ĉion, kio helpas al plifortigo de la paco, al reciproka interfratiĝo kaj kompreniĝo. Neniu povas tion malpermesi al vi.

Kiel mi fondis E-rondeton en nia lernejo? - Krom gimnastiko mi instruas geografion. La lecionojn de la geografio mi riĉigadis per diversaj interesaĵoj. Mi alportadis eksterlandajn bildkartojn, fotografiaĵojn ktp. Kiam la lernantoj demandis min de kie mi havas la aĵojn, mi rakontis al ili, ke mi estas esperantisto kaj kio estas Esperanto. Ili tuj havis grandan intereson, ĉar logis ilin la belaj poŝtmarkoj kaj glumarkoj. Tiamaniere mi senĉese "inokulis" ilin fine ili mem petis pri la fondo de E-rondeto. Kiam mi poste diris al la direktoro, ke laŭ la intereso de la lernantoj, mi volas fondi "Pioniran Esperanto-rondeton de junaj pacdefendantoj" kaj kiam mi klarigis al li, kio estas Esperanto-pacmovado (bone helpis la gazeto "Pao"), li kompreneble ne estis kontraŭ kaj post unu jaro li eĉ fieris, kiam alvenis distrikta kaj regiona inspektoroj, ke nia lernejo havas tian rondeton, kiu jam tiom faris pro la mondpaco, interfratiĝo kaj kompreniĝo de la nacioj. Ion similan povas atingi ankaŭ vi, geinstruistoj-esperantistoj.

Antaŭ la jaro 1955 nia lernejo ne praktikis ruslingvan korespondadon kun sovetaj lernejoj. Nia instruistino de rusa lingvo vane serĉadis, helpe de rusa lingvo, ian sovetan lernejon por reciproka korespondado. Helpis nia E-rondeto, kiu per Esperanto facile plenumis ĉi tiun taskon. Do, ion similan vi povas ankaŭ eluzi por fondi Esperanto-rondeton.

Komence de la jaro 1956 oni longe preparadis en nia lernejo pioniran ekspozicion de manlaboraĵoj kaj desegnaĵoj. Kompreneble mi eluzis tiun eblon kaj ankaŭ nia E-rondeto ekspoziciis. La desegnaĵoj el Anglujo kaj precipe el Japanujo, krom la aliaj interesaĵoj, vekis meritplenan atenton.

Kiam januare 1956 okazis regiona kunveno en Olomouc, ni ankaŭ partoprenis ĝin. La 300 Kĉs, kiun mi elpetis de Gepatra Kunularo (SRPS) sufiĉis por tri knaboj, tri knabinoj kaj mi. La Gepatra Kunularo (Asocio de gepatroj kaj geamikoj de la lernejo) subtenas min ankaŭ nun bone. Ili pagas al ni poŝtelspezojn, abonpagojn, vojaĝelspezojn k.s.

La unuan jaron de nia agado ni finis solene. Ni organizis la Internacian Sportkonkurson de Esperantistaj Lernejoj, kiun ni efektivigis dum la Internacia Tago de Infanoj la 1-an de junio 1956 kaj kiun ni ĉiujare tradicie ripetadas. (Vidu Tagiĝon n-ro 41). Vi ne povas imagi, kiel ni estas feliĉaj, ke ni ekkaptis tiel bonan ideon, kiun poste (aŭtune 1956) kopiis de ni redakcio de "Pionýrské noviny".

Sur la koridoro de nia lernejo ni havas konstantan vitrokeston: kaj murgazeton, kiuj propagandas nian porpacan laboron. Ilian enhavon oni ofte ŝanĝas, ĉar ni havas sufiĉe da materialo, kiun ricevas niaj lernantoj el multaj landoj de tuta mondo.

Sed ni ankaŭ klopodas esti utilaj al la tuta lernejo. Ni invitis instruiston - esperantiston J. Vítek, kiu prelegis pri sia restado en Finnlando. Lia prelego "Finnlando" - lando de 80.000 lagoj" kompletigita per kolorfilmo proksimigis al ni la malproksiman landon kaj ĝian laboreman popolon.

Plej ŝate ni rememoras renkontiĝon kun polaj geknaboj-esperantistoj sur la lima monto Ĉantorio. Ĉi tie ni povis nin reciproke ekkoni, rakonti, starigi novan amikecon kaj promesi al ni, ke ni disvolvos kaj profundigos ĝin. Ankaŭ la ceterajn ni informas pri nia laboro. Ilia rondetano

rakontis pri siaj rezultoj kaj sukcesoj dum la malferma solena kunsido de la II-a pionira distrikta kongreso en Český Těšín. Samtempe ni preparis materialon por la pionira ekspozicio, kiu tiam okazis. Ĝi vekis meritplenan atenton kaj direktoro de la loka muzeo postulis ekspoziciaĵojn por la muzeo.

Per ekspozicio en la loka muzeo de distrikta urbo Český Těšín ni faris vere multon por propagandi nian aferon. Ĉio estis ekspoziciita en tri grandaj montrofenestroj sur la ĉefstrato. La ekspozicio daŭris tri monatojn kaj havis kelkajn sekvojn.

Unue: La distrikta pedagogia centrejo (OPS) post interkonsilo kun inspektoroj, petis nian rondeton, ke ni dum solenaĵoj de J. A. Komenský efektivigu paroladon pri Esperanto-pacmovado. Ĝi efektiviĝis en urbo Třinec, kie mi prelegis al geinstruistoj de la distrikto Ĉ. Těšín.

Due: La ekspozicio vekis tian intereson pri Esperanto, ke direktoro de la Pionira domo en Ĉ. Těšín, traktis kun mi pri Esperanto-kurso.

Trie: Vidinte la ekspozicion, sinjoro Szebik Bronislav el Podobora ĉ. 238 distrikto Ĉ. Těšín, petis min, ĉu mi povas al li helpe de Esperanto prizorgi greftojn de malvarmorezistaj pomujoj el Svedujo. Por montri praktikecon de Esperanto mi prizorgis ilin.

Kvare: La distrikta pedagogia centrejo en Ĉ. Těšín petis min, ke niaj rondetanoj dediĉu unu leteron speciale al la batalo por la mondpaco. Ni respondis, ke temon pri la pacbatalo enhavas ĉiuj niaj leteroj sendetaj eksterlenden, sed ni krom tio verkis 16 tiajn leterojn, kiujn ili postulis kaj ni sendis ilin en kapitalistajn landojn.

Plua entrepreno, kiun ni faris, estis speciale pacbatala. Aŭtune 1957 ni organizis laŭ ekzemplo de la Mondpaca Esperantista Movado en nia lernejo la subskriban kampanjon por malpermeso de uzado de la atomarmiloj. La deklaron subskribis ĉiuj niaj gelernantoj, geinstruistoj kaj partoprenintoj, de la jarkunveno de le Gepatra Kunularo (SRPŠ). Interalie subskribis ĝin ankaŭ regiona inspektora kamarado Folwarczný kaj distrikta inspektoro kamarado Remeš.

Mi priskribis mallongan historion de nia lerneja E-rondeto kaj mi kredas, ke multon vi povas ankaŭ imiti kaj uzi por fondi E-rondeton en via lernejo.

Nua ankoraŭ kelke da konsiloj al tiuj, kiuj ne estas instruistoj. Vi ankaŭ ataku lernejojn. Unue vi devas interesigi aŭ direktoron de la lernejo aŭ iun el instruistoj, kiu poste helpos al vi. La direktoron vi facile interesigos, kiam vi montros al li diversan propagandan Esperanto-pacmaterialon kaj se vi diros al li, ke en lia lernejo estos rondeto, kiun ne havos la najbara lernejo. (Kredu, ke ili estas preskaŭ ĉiuj vantemaj, memplaĉaj.) La gimnastikinstruiston interesigu pere de la Internacia Sportkonkurso de Esperantistaj lernejoj (vidu la antaŭajn n-rojn de Tagiĝo). La desegnoinstruiston pere de interŝanĝo de desegnaĵoj. La kantinoinstruiston pere de interŝanĝo de kantoj. La botanikinstruiston pere de interŝanĝo de diversaj zoologiaj kaj botanikaj kolektoj. La ruslingvan instruiston pere de trovo de sovetaj lernejoj, kiuj deziras korespondi kun via lernejo ruslingve. La geografiinstruiston pere de interŝanĝo de bildkartoj ktp. Ĉiu el vi povas elpensi ian logilon por ĉiu el ili. Sed vi mem unue ne forgesu korespondi kaj denove korespondi. Ĉar nur pere de korespondado vi ricevos multe da interesaj aĵoj kaj poste estas pli facile interesigi kiun ajn. Ne preterlasu ankaŭ instruiston, kiu gvidas en la lernejo pioniran grupon. Li aŭ ŝi ĝojsaltos, se vi ekzemple diros, ke helpe de Esperanto vi povas prizorgi amikajn kontaktojn inter lia kaj iu ĉina aŭ vietnama pionira grupo.

Gesamideanoj, pripensu ĉion bone kaj certe vi sukcesos. Memoru, ke de ni Esperantistoj dependas nia esperantista estonteco. Se vi sukcesos, ne forgesu tuj doni al mi raporton, por ke mi povu tien sciigi al ĉiuj pere de rubriko "Esperanto en lernejoj".

Do sukceson al vi!

Enigma kurso

Hodiaŭ la kurson preparis Vladimír Novotný.

Sed unue kontrolu vian solvon de la enigmoj en la 41-a numero:

1. **ŜANGŬUMO:** benata bako, bona tabako.
2. **ĈEVALIRO:** "Post multaj miljaroj da reciproka surda muteco kaj batalado nun en Bulonjo sur Maro fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos." - Parto de la parolado de D-ro L. L. Zamenhof en la 1-a Universala Kongreso Esperantista en Boulogne sur Mer (Francujo) 1905.

La 19.11. en kunveno de la E-Junularo Ostrava estis ellotita el 9 ĝustaj solvintoj s-ano M. Hromas el Hradec Králové, al kiu estis sendita libropremio "Paŭlo Debenham", originala romano de H. A. Luyken.

Kaj nun ni daŭrigu en la kurso:

MULTIGENIGMO. Ĉeĥe nomiĝas tiu ĉi enigmo "množenka". Oni solvas ĝin tiel, ke la bazan elementon (vorton aŭ vortgrupon) oni multigas kaj ricevas tute novan esprimon. Ekzemple:

Se ni multigas la anon de la nacio, ni ricevas argiletojn por polurado de metaloj.

Solvo: polo, tri poloj - tripoloj.

ANAGRAMO. Ĉeĥe nomata "přesmyčka". Ŝanĝu lokojn de unuopaj literoj kaj faru el ili novan vorton aŭ esprimon. Ekzemple:


REVO Solvo: vero.

Kaj nun taskoj por vi:

1. **MULTIGENIGMO (Novotný):** Mia kara HEJMA BESTO,
ĉu ĝi estas forvendota?
Ĝi fariĝos por mi festo -
MONO estas ricevota.
2. **ŜANGŬUMO (Novotný):**
Mi pensas, ke al BESTO-ARBARANO
en la kapo mankas PENSORGANO.
3. **ANAGRAMO (Novotný):**
NERO PETAS
4. **KRUCENIGMO (L. Rejthárková):**

HORIZONTALALE: 2. kolekti fruktojn, 3. loĝejo de birdo (r), subteni objekton aŭ personon, 4. konjunkcio kaj substantiva finaĵo, tri muziknotoj, komenci, 5. unua duono de "ĝeno", kantbirdeto (r), tempo de post la naskiĝo (r), 6. sankta bildo, grava danĝera fazo, 7. konsonantoj de "noto", difavoro, sufikso de sekso (r), 8. de sovaĝa eŭropa bovo, esti oka, muziknoto inter kemiaj signoj de sulfuro, 9. angla mezur-unuo de longo, je pli alta grado, 10. loĝanto de kontinento (r).

VERTIKALE: B. energia, montriĝanta per lumaj kaj varmaj



fenomenoj, C. besto, subst. finaĵo, loko en la centro de cirko (r), D. meblo (r), unua duono de "angoro", vica numeralo, E. prefikso, kreskaĵo, konsonantoj de "rato", F. de marparto eniĝanta en la teron, teatra ludisto (r), G. prepozicio, publika procedo de vendo (r), duono de "peko", H. duono de "stango", mallongigo de "doktoro", ni ĉiuj deziras ĝin (r), I. per lipoj, finaĵo verba, diversaj konsonantoj, J. prepari.

La solvojn sendu al la redakcio antaŭ la 31. 1. 1959.

KORESPONDI DEZIRAS:

Vergil Petrisor, Det. 4 1d. I. G. , Hunedoara, RUMANIO. 25j. geodeziisto

NOVAN ADRESON ANONCAS:

Dieter Berndt, Nová Kamčatka, Petřvald u Karviné, ĈSR .

NOVAJ ELDONAĴOJ:

Vítkovické železářny K. Gottwalda festas ĉi-jare sian 130-jaran ekziston. Ĉe tiu okazo la E. rondeto de tiu ĉi konata ferfabriko eldonis belan poŝtkarton kun E. teksto desegnitan de ak. pentristo M. Zezula. Ĉiu, kiu skribos al la suba adreso, ricevos ĝin bele afrankitan. Okaze de la jubileo skribu gratule al: Vl. Kočvara, Kamenec 3, OSTRAVA VIII, Ĉeĥoslovakio.

VARSOVIO. Okaze de la 44-a U.K. la Pola Turisma oficejo eldonis prospekton pri Varsovio en Esperanto. Ĝi estas ricevebla senpage en la Pola Vojaĝoficejo "Orbis" en ĉiuj landoj.











RAVENNA (Italio). Esperanto-grupo en Ravenna eldonis 32-paĝan ilustritan gvidilon pri la urbo Ravenna. Vi povas ĝin senpage ricevi de la eldoninto. Adreso: Esperanto-grupo, RAVENNA, P. Anita Garibaldi 1, Italio.

DEK AFORISMOJ, EL KIU, ESTAS SENTENCO ĈIU NE SEN SENCO



TEXTO: RAYMOND SCHWARTZ
MUZIKO: MIDAR ALDUK

TEMPO KAJ RITMAJ ŜANĜOJ
DIRKTIĜU LAŬ LA ENHAVO!



ELDONAS: Esperantský odbor Domu osvěty P. Bezruče v Opavě
 ADMINISTRAS: J. Kuzník, Opava, U Jaktářaké brány 8, ČSR.
 Ĉi n-ron ilustris: Ing. ark. M Kalný.